



madrida esperanto-liceo

septembro 2018

MULTAJ PLANOJ POR SEPTEMBRO

La komenco de la lerneja jaro estos tre intensa en la esperantista movado en Madrido.

Por komenci, la jam tradicia sabata renkontiĝo okazos ĉifoje la duan sabaton, la 8an de septembro, en la kafejo de la Kulturdomo "Medialab Prado", strato Alameda 15, enirejo vid-al-vid de la Kulturcentro "La Caixa", je la sesa horo. Kiel en pasinta junio, ni anoncos ĝin en la platformoj por retaj lernado kaj renkontiĝoj, ekz. Duolingo, Meetup, ktp, por allogi novajn parolantojn.

La semajnfino de la 14a ĝis 16a vizitos nin nia juna amikino Fatma Eroĝlan, el Turkio, kiu venas al Madrido pro laboraj kaŭzoj. Ni provos renkonti ŝin dum tiuj tagoj, sed ankoraŭ ne fiksis rendevudetalojn, do estu atenta al la sociaj retoj kaj retforumoj por konkretigi ilin.

FOIRO DE SOLIDARA EKONOMIO

La tagojn 22an kaj 23an de septembro, sabaton kaj dimanĉon, okazos la Foiro de Solidara Ekonomio, kaj Madrida Esperanto-Liceo havos budon en ĝi. La loko estos la kulturcentro Matadero, apud Legazpi. Vidu detalojn en: <http://laferiamadrid.mercadosocial.net/>.

Dum la tuta semajnfino, miloj da vizitantoj vidos nian tablon kaj panelojn montrantaj informilojn kaj librojn por lerni Esperanton. Sed por tio necesas la kunlaboro de kelkaj volontuloj. La horaro de la foiro estas: sabate de 11:00 ĝis 23:00 kaj dimanĉe de 11:00 ĝis 20:30. Almenaŭ du homoj deĵoru en ĉiu momento; do, se ni dividas la tagon en du partoj, necesas minimume ok deĵorantoj. Se ni estos pli, des pli bone. Anoncu vin al la adreso madrid@esperanto.es, dirante kiun tempon vi preferas.

Krome, oni programis diversajn kromajn aktivadojn, inter kiuj prelegon pri "La cuestión del idioma en la comunicación internacional", kiun gvidos MEL. Tiu okazos la sabaton, 22, je la 15,00 h. en la iama gimnastikejo de la kulturcentro "Casa del Reloj".

EŬROPA SEMAJNO DE LA LINGVOJ

Fine de septembro oni festos en Madrido la Eŭropan Semajnon de la Lingvoj, profitante la Tagon organizitan de la Konsilio de Eŭropo. Ĝin organizos la asocio de institutoj por lingvoj EUNIC, <http://eunic-espana.eu/>, kaj en tiu ĉi jaro oni denove invitis Hispanan Esperanto-Federacion. Ni partoprenos interŝanĝon de lingvoj la vendredon, 28an de septembro. Dum venontaj tagoj oni fiksis detalojn pri loko, horo kaj organizado, do restu en kontakto por partopreni la agadon kaj informi eksterajn interesitojn.

KURSO EN SIDEJO

Pedro Hernández anoncis la okazigon de nova kurso por lerni Esperanton en la sidejo de MEL, komencante en oktobro. Plej probable ĝi okazos ĉiujn sabatojn inter 11,00 kaj 13,00, en strato Rodríguez San Pedro 13. La kurso daŭros tri monatojn, la aliĝo estos senpaga kaj la instruisto havigos la lernmaterialojn. Interesitoj bv. skribi al la adreso madrid@esperanto.es, por informiĝi.

KURSO EN UNED

Kiel ni anoncis en pasintaj numeroj, la Nacia Universitato pri Neĉeesta Edukado UNED, pere de sia lingvolerna centro CUID, proponas lernadon de Esperanto per neĉeestaj rimedoj, kun oficiala titolo. La enskribiĝo komenciĝas jam la 3an de septembro.

Vidu ĉiujn detalojn ĉe: <http://www.cuid.uned.es/>, kaj diskonigu inter viaj proksimuloj.

GRANDA SUKCESO DE LA IBERIAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

Dum la pasintaj du monatoj disvolviĝis kun granda sukceso pluraj kongresoj en la Iberia Duoninsulo, kiun aktive partoprenis madridaj esperantistoj.

Ĉefe gravaj por madridanoj estis la 77a Hispana Kongreso kaj la 51a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiuj okazis parte koincide en Madrido mem inter la 20a kaj 28a de julio. Ĉeestis ĉ. 250 homoj, kiuj venis al Madrido el plej diversaj partoj de la mondo, inklude multaj el Azio, Ameriko kaj ankaŭ el du afrikaj landoj. La inaŭguron ĉeestis la vicrektorino de universitato UNED kaj la skabenino-prezidanto de la distrikto Moncloa. Legu raporton en la retejo de UNED:



http://portal.uned.es/portal/page?_pageid=93,63834407&_dad=portal&_schema=PORTAL

Multaj madridanoj vizitis poste la Universalan Kongreson de Lisbono kaj la Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Badaĥozo. Tiun ĉi partoprenis pli ol 250 homoj, el kvindeko da landoj, kun granda sukceso organiza kaj informa. Dum ĝi estis elektita kiel nova prezidanto de HEJS, la junulara sekcio de HEF, la madridano William Guerrero.

VIZITIS NIN

La nombro de nemadridaj esperantistoj vizitintaj la urbon dum pasintaj semajnoj estis preskaŭ nenombrebla, multaj survoje antaŭ aŭ post la kongresoj. Espereble vi ĉiuj profitis la ŝancon koni novajn amikojn kaj praktiki la lingvon.

INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

La 26-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, okazos en Salou de la 29a de septembro ĝis la 6a de oktobro. Pliajn informojn ĉe: <http://esperanto-salou.blogspot.com/>.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL reprenas sian normalan ritmon kaj denove okazos ĉiulunde post la 18,30.

Pri aliaj rendezuoj dum la monato, vidu la antaŭajn anoncojn. Por esti informitaj pri konkretaj detaloj kaj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrive/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al nivocho@gmail.com